**Katastrofa forŝoviĝo**

La tertremo komence de la 20a jarcento - ekzakte je la 5a horo kaj 12 minutoj de la 18a de aprilo 1906 - estis ruiniga por la urbo Sanfrancisko en Usono. Forŝoviĝo de la *San-Andreas*-fosego je proksimume 6 metroj kaŭzis teruran tremon de la tero kun impeto same kiel eksplodo de 12 milionoj tunoj da TNT (mallongigo por la eksplodaĵo "trinitrotolueno"). Sanfrancisko fariĝis ruinejo kun amaso da rubo.

En la multanombraj lignaj domoj, salonoj, vendejoj kaj magazenoj falis arda fulgo el kamentuboj en la ĉambrojn kaj ekscitis fajron. Jam je la 9a horo kvindek grandaj incendioj furiozis tra la detruita urbo. Pro damaĝitaj ĉefaj akvotuboj la fajrobrigadoj estis senhelpaj, la fajroestingaj pumpiloj senutilaj.

Oni ne povis estingi la flamojn. Post sunsubiro ankoraŭ en distanco de 80 km estis videbla la hele lumigita ĉielo super la urbo. Kiam post 3 tagoj la fumo disiĝe malaperis, la tertrema bilanco estis 450 mortintoj, 200 000 senhejmuloj kaj 28 000 detruitaj konstruaĵoj.

Tiam la antikva, fama, tipe usona "Sovaĝa Okcidento" por ĉiam detruiĝis kaj cindriĝis. (2001-04-18)

**Teon kun lakto aŭ lakton kun teo?**

Ĉe aliaj eŭropanoj ne tiel familiara kiel en Britujo: por mildigi la amarecon de forta teo-infuzaĵo pleje bonas lakto. La tanino de la teo ĝin amarigas; lakto kontraŭe enhavas multajn proteinojn, kies longfalditaj ĥemiaj ĉenoj kombiniĝas kun la taninaj molekuloj kaj neŭtraligas la amarecon.

Tio bone funkcias okaze de **malvarma** teo kaj **malvarma** lakto. Sed tio **ne funkcias,** kiam ambaŭ trinkaĵoj estas **varmegaj**, ĉar hejtigitaj proteinoj perdas sian kombinpovon. Tiu ĉi proteina denaturiĝo same okazas, kiam **malvarma** lakto estas verŝata en **varmegan** teon.

Kiam, kontraŭe, oni verŝas la **varmegan** teon sur la **malvarman** lakton, tiam la miksaĵo estas ankoraŭ tiel temperaturregulita, ke la laktoproteinoj povas mirakle mildigi la teon - per ĉirkaŭvolvi la taninojn. (2001-03-15)

(Fonto: ĉiuj sciindaĵoj el *Brockhaus*-enciklopedia kalendaro "Kio ne troviĝas tiel en la leksikono"; post la unuopaj tekstoj enkrampe la dato de la koncerna kalendarfolio)


# Scienca Revuo Vol. 53 (2002)(2) / n-ro 189

*Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (SAE)*

**Pres-indikaĵoj**

ISSN 0048-9557, Eldonanto: ISAE

Laserkopiita: Aprilo 2002

**Responsa redakta teamo**

La estraro de ISAE

**Responsa redaktanto por tiu ĉi kajero**

*R. Sachs (DE) – sa*

**Kunredaktanto**

*J. Kavka (CZ) – ka*

**Lingvaj kontrolantoj**

*O. Haszpra (HU) – ha, S. Schweiger (GE) – sc, J. Wozniczka (PL) – wo, W. Blanke (DE) – bl, J. Werner (CZ) – we*

**Eldonkvanto : 200**

Adreslisto laŭ kotizoj ricevitaj antaŭ ekspedo

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la koncernaj aŭtoroj. Ili ankaŭ respondecas pri formo kaj formato, se ili mem kompostis.

**Redaktaj rimarkoj pri la artikoloj**

| | | |
|---|---|---|
| 1. *Dudich* | komp sa | red ka/ha |
| 2. *Werner* | komp sa | red wo/ha |
| 3. *Milnera* | komp sa | red ka/ha |
| 4. *Atkinson* | komp sa | red sa |
| 5. *Bonvecchiato* | komp sa | red bl/ha |
| 6. Scienca eĥo | komp sa | red sa/ha |

komp = kompostis; red = kontrolis kaj redaktis

**Membrokotizo de ISAE : € 20.00/jare**

prefere al

**Poŝtbanka konto n-ro 140 380-608 nome de ISAE-Sachs**

ĉe Postbank Frankfurt/Main, Germanio, Banka kodo 500 100 60

aŭ al

**ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL) : isae-z**



**Nepre informu pri via pago (kaj kompleta adreso) la eldonanton:**

***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***

***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <IsaeSachs@aol.com>***